# TEJO-aktuale: numero 117, 2003-07-14

---

T E J O - A K T U A L E N-ro 117 (14 julio 2003)

---

Senpaga informletero de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
<http://www.tejo.org>;

---

1. PROBLEMOJ ĈE TEJO-AKTUALE
2. INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN SVEDIO: DOKUMENTOJ POR LA TEJO-KUNSIDOJ
3. TREJNKURSO PRI EŬROPA CIVITANECO
4. NOVA RETEJO: LINGVA PRISMO

---

## 1. PROBLEMOJ ĈE TEJO-AKTUALE

Pro teknikaj problemoj ĉe la servilo esperanto.org, dum kelkaj semajnoj ni bedaŭrinde ne povis sendi TEJO-aktuale. Espereble tiu ĉi numero atingos ĉiujn abonantojn, kaj post la baldaŭa Internacia Junulara kongreso ĉio definitive solviĝos kaj ni rekomencos dissendi ĉiulunde.
Ni pardonpetas al la legantoj!

---

## 2. INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN SVEDIO: DOKUMENTOJ POR LA TEJO-KUNSIDOJ

Dum la Internacia Junulara Kongreso (IJK) <http://www.tejo.org/ijk>; okazonta en Svedio, kunsidos la Komitato de TEJO. Ĉiuj interesiĝantoj bonvenas!
Por informiĝi antaŭ la kunsidoj indas legi la dokumentaron ĉe <http://www.tejo.org/ijk/komitatkunsido.php>;.
Interalie la Komitato elektos la estraron por la periodo 2003-2005; la kandidatoj prezentiĝas ĉe <http://www.tejo.org/ijk/kandidatoj.php>;.

---

## 3. TREJNKURSO PRI EŬROPA CIVITANECO

Eŭropa Junulara Centro, Budapest (Hungario), 19a - 30a de Oktobro 2003: la Eŭropa Junulara Fondaĵo organizas trejnkurson pri Eŭropa Civitaneco por junularaj aktivuloj <http://www.training-youth.net/meetings.htm#european>;.
Limdato: la 10a de aŭgusto. La kandidatoj nepre sendu la aliĝformularon al la TEJO-volontulo <oficejo@tejo.org>.

---

## 4. NOVA RETEJO: LINGVA PRISMO

La internacia laborgrupo Esperanto@Interreto lanĉis la novan retejon "Lingva Prismo" <http://www.lingvo.info>;. Ĝi celas montri la buntecon kaj diversecojn de la lingvoj de la mondo. Se vi volus traduki la paĝaron al via lingvo vi povas tion fari per <http://lingvo.info/tradukado>;.
Tradukemuloj kaj helpemuloj bonvenas ĉe la retlisto <lingva_prismo@yahoogroups.com>. Komentoj kaj ideoj sendeblas ankaŭ al <prismo@lingvo.info>.

---

_

TEJO-AKTUALE - Senpaga informletero de TEJO

La ideo: <http://www.esperanto.org/tejo/publikaĵoj/aktuale/koncepto.html>;.

La arĥivo: <http://www.tejo.org/tejo-aktuale>;.
Por aboni sendu mesaĝon al <majordomo@esperanto.org> kun la enhavo:
subscribe tejo-aktuale.
Informojn kaj komentojn sendu al <tejo-aktuale-red@esperanto.org>.
La teamo de TEJO-aktuale estas:
Jevgenij Gaus, Giuseppe Castelli, Chuck Smith.
Tiun ĉi numeron redaktis Giuseppe Castelli.